




**Somere de la jaro 1985 kelkaj samideanoj, kaj landaj kaj eksterlandaj, vizitis la esperantistaron de nia urbo. Jen fot-raportaĵo de tiuj renkontiĝoj de esperantistoj.**

tuta Homaro, sed ĉefe por la tutmonda laboristaro kiu tute ne disponis la necesajn ekonomiajn kapablojn por lerni alilandajn lingvojn. Post tiu prelego, estis belega kantado far de la “Infana Ĥoro” de la Urba Muzik-Lernejo, kaj iu la infanaj membroj de tiu ĥoro deklamis en Esperanto poeziaĵojn de G. A. Becker.

En la Ĝenerala Asembleo de la membroj de Astura Esperanta Asocio, okazinta la 13an de februaro de 1986, partoprenis S-ro Chapoli, la ĉefzorganto de la Esperanta afero en Navia. Oni traekzamenis la agadon de nia A. E. Asocio de la antaŭa jaro kaj programis tiujn de la nova. Samideano Chapoli temis pri la faritaĵoj kaj la planoj de la E-rondo de Navia. Li informis ke oni estis instruante Esperanton a 23 gelernantoj de la Mezlernejo de Navia kaj ke 12 instruistoj de alia mezlernejo, kun 150 gelernentoj, sin preparis por atingi la titolon de E-instruistoj. Estis ankaŭ kurso de Esperanto per Radio-Navia. Li havis grandajn planojn por esperantista agado en tiu urbo, kaj faris la proponon organizi tie la **Unuan Asturan Kongreson de Esperanto**. Oni aprobas tiun proponon kaj decidas ke la dato de tiu kongreso estu de la 20a al la 22a de junio de tiu jaro 1986. En tiu sama kunsido oni pristudis ankaŭ la partopreno de la astura esperantistaro en la celebrado de la **Centjara Jubileo de Esperanto** kiu estis okazonta en la sekva jaro 1987.

La **Unua Astura Kongreso de Esperanto** efektive okazis en Junio de 1986, sed ne en la menciita dato sed unu semanon poste. Ties sidejo estis la urbo Navia kie antaŭe estis preskaŭ nenia esperantista tradicio kaj subite floris nia afero sub la vigla iniciato kaj laboro de samideano José Carlos Chapoli Motta.

Partoprenis en tiu kongreso, krom la samideanoj de tiu urbo, ankaŭ geesperantistoj alvenintaj el Avilés kaj Gijón. Vendrede, la 27an de junio okazis la Interkona Vespero kiu disvolviĝis per la kutime distra kaj emociiga etoso de tiaj programeroj. Sekvinttage, la 28an de junio, matene estis la ekzamenoj pri Esperanto en kiuj partoprenis, krom gelernintoj el Navia, ankaŭ iuj de Gijón. Vespere estis la solena Malfermo de la Kongreso, al kiu sekvis iu folklora festo. Dimanĉe la 29an, estis kolokvo pri la temo: “La Eŭropa Ekonomia Komunumo bezonas nian Internacian Lingvon”.

Oni devas reliefigi, ke en tiu **1a Astura Kongreso de Esperanto**, oni larĝe honoris nian Asturan Esperantan Asocion per aljuĝado fare de **I.L.E.I.** de diplomoj al niaj samideanoj Santiago Mulas, Julio Argüelles kaj Adonis G. Meana pro sia entuziasmo, intereso kaj aktivado en la porEsperanta laborado. La diplomojn transdonis Sro. Francisco Zaragoza. Sed ankoraŭ pli honorigaj estis la okaze de tiu Kongreso starigitaj premioj: **Sindona por-Esperanta laborado** dum la tuta jaro al Francisco Zaragoza; **Esperanta Literaturo**, aljuĝita al Santiago Mulas, pro la historieto “La katineto de mia avino”, publikigita en **HELECO**, kaj **Internaciaj Rilatoj nome de A.E.A.**, aljuĝita al Julio Argüelles. Tiuj-ĉi premioj konsistis el belaj surgravuritaj metalaj platoj.